

la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de Esperanto-Societo Kebekia

Marto 1987. Numero 6-a. Jarkolekto 2-a.

Kun nova stilo

Vi eble rimarkis, ke tiu ĉi LA RIVEREGO estas multflanke nova. Ni havas novan fronttitolon, kiun afable desgnis por ni Michel Légaré, de Alma. Ni multe dankas lin. La antaŭan titolon mi estis farinta, simple ĉar LA RIVEREGO bezonis fronttitolon.

Vi ankaŭ verŝajne rimarkis, ke nun LA RIVEREGO estas komputile farita. Tio igas la redaktadon pli rapida, kaj korektadon pli facila, la titolojn pli rektaj... Ĝi estas tajpita per la MACINTOSH de Patriko Mongeau, en kiu estas programo por krei novajn literojn, kun supersignoj, ekzemple. Mi ankaŭ sciigas, ke la teksto estas fote malpligrandigita, tiel ke ni ŝparu je fotokopiad- kaj sendo-kostoj.

La estraro de ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA ankaŭ decidis ŝanĝi la aperdatojn de la bulteno. Ĝi ekde nun aperos en marto, junio, septembro kaj decembro. En 1987 sekve estos escepte kvin numeroj. Oni konsideris la novajn datojn pli taŭgaj. Sekve, tiuj, kiuj volas kontribui al la venonta LA RIVEREGO sendu tekstojn kaj leterojn tiel, ke ili alvenu ĝis la fino de majo.

Ankaŭ estas loko en la bulteno por klubaj paĝoj. Ĉi-foje partoprenis nur la MONTREALA KLUBO. Kompreneble ankaŭ la Ŝerbruka kaj la Ibervila kluboj povas partopreni. Ili kontaktu la Societon. □

Akvanezio bonvenigas enmigrantojn

de Patriko Mongeau

Lando tiom malgranda kiom Monako, kie la parolata lingvo estas esperanto, ĉu alloga loko por ferii? Ĝi konsistas el kelkaj insuloj sude de Nov-Skotio. Kiom ĉarme kaj proksime! Kial tien eĉ ne transloĝiĝi?

Ĉu fikcio aŭ realo, tiu landeto? Kiom da loĝantoj ĝi entenas? Kion la loĝantoj faras?

Fakte ankoraŭ ne estas realo, sed eble realigotaĵo. Mark Hucko, Svislandano, posedas tiujn insulojn kaj projektas estigi sur ili esperantujon. Li bezonas helpon por renovigi domojn kaj organizi esperanto-centron akceptantan feriantojn. Domojn renovigendajn pruntepreneblas kontraŭ simbola unudolara prezo. S-ro Hucko venos en *Akvanezion* - elektita nomo de la lando - ĉi-somere por komenci la renovigan laboron, kaj bonvenigas helpantojn, esperante ke estontece la lando bonvenigos vizitantojn. Laŭ li, tiu lando povas multe helpi seriozecon kaj propagandon de esperanto.

Interesatoj kontaktu Patrikon Mongeau. Se pluraj ŝatus iri, ni kune revos kaj vojaĝos. □

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate.

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Redaktoro: Sylvain Auclair.

Kontribuis Suzanne Bolduc, Kajmo Brent, Petro Collinge.

Patriko Mongeau kaj Bertil Wennergren.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo. UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0,50 \$ plus sendokostoj.

Adreso:

Société québécoise d'espéranto

C.P. 126, succ. Beaubien

Montréal, Québec

KANADO H2G 3C8 Telefono: (514) 495-8442

Maskuto: novaj informoj

La unuan anoncon pri la ĉi-jara kanada kongreso vi jam ricevis kun la pasinta LA RIVEREGO. En la ĉi-dua, ni aldonas multajn novajn detalojn.

Estis du eraroj pri la prezoj en la Auberge des Seigneurs. Unue, la rabato se venas sufiĉe da homoj estas 15\$, ne 25\$. Tamen la prezojn mem ni kalkulis laŭ la ĝusta rabato. Due, tiu gastejo nur postulas ke ni mendu 20 ĉambrojn, ne 30, por havi rabaton. Sufiĉan mendon por havi la rabaton ni ne povas garantii. Tial, tiuj kiuj mendas ĉambrojn ĉe la Auberge des Seigneurs devas supozi, ke la prezoj estos 74\$ por unu persono kaj 84\$ por du. Nepre menciuj ke vi mendas ĉambrojn por ĉeesti la KANADAN ESPERANTAN KONGRESON. Tiel, surloke, ili povos kalkuli kiom da ĉambroj estas menditaj por la kongreso kaj decidi pri la rabato. Tiam eble la prezoj malaltiĝos je 15\$, farante 59\$ kaj 69\$.

Kelkaj homoj plendis pro la lukso de la elektitaj gastejoj. Aliaj hoteloj, malpli multekostaj, piede ireblaj, elekteblas. Iom malpli proksime, eblas ankaŭ tendumi. Estas laŭ mi facile ne rezervi ĉambrojn kaj surloke elekti gastejon. Vi povas ankaŭ peti informon pri loĝeblecoj ĉe:

Comité d'implantation du Bureau de tourisme et des congrès de Saint-Hyacinthe
735, rue Ste-Anne,
Saint-Hyacinthe, Québec
J2S 5G6
telefono: (514) 774-7276

Esperantaj kluboj anoncu kiu reprezentos vin ĉe la kongreso kaj salutos nome de la klubo.

Tiuj kiuj havas monproblemon kaj ŝatus tamen veni, anoncu vin kaj aliĝu. Ni provos trakti tiun problemon konsiderinte la nombron de petoj. Atendu respondon.

Estas du aldonoj al la programo: ESPERANTO-SOCIETOKEBEKIA okazigos sian jarkunsidon sabate de la 13a ĝis la 15a (parte dum la konversacia rondo) kaj dimanĉe, post la kongreso, ni proponas piknikon ĉe la monto Saint-Hilaire je la 14a. Partopreno al la pikniko estas libervola. Ĉiu devas memzorgi pri la manĝado kaj veturo. Paŝado sur la monto eblos post la pikniko. Se pluvas, la pikniko verŝajne ne okazos.

Prelegantoj kaj oratoroj sin anoncu. Por partopreni la konversacian rondon, ankaŭ necesas aliĝi. Se vi jam aliĝis la kongreson kaj volas partopreni tiujn programerojn, sendu leteron. Partoprenon en tiuj programeroj vi devas anonci antaŭ la unua de julio por ke ni havu ideon pri la nombro. □

Ĉu Kebeko aŭ Kebekio?

de Bertil Wennergren

B. Wennergren estas Svedo kaj Centra Respondeculo de la PASPORTA SERVO. En tiu ĉi artikolo, li klarigas kial li uzis la nomon KEBEKO (anstataŭ KEBEKIO) en la adreslisto de P.S.

Oni povas rigardi la kazon Québec (kaj provinco kaj urbo) kiel izolitan kazon solvendan por si mem sen konsidero al aliaj esperantigendaj nomoj en la mondo. Tiel verŝajne agis la Kebekaj esperantistoj alvenante kun certa pravo al la elekto KEBEKO (urbo) kaj KEBEKIO (provinco). Tio estas ja sufiĉe oportuna diferencigo.

Sed eblas ankaŭ rigardi Québec ne kiel memstaran aferon, sed kiel eron de pli granda problemo, nome la problemo de homonimaj geografiaj. Ekzistas aro da geografiaj nomoj, kiuj nomas ne nur landon, sed ankaŭ iun aferon (urbon, riveron, lagon, monton, ktp) en tiu lando. Zamenhof konsciis pri tiu «problemo» kaj proponis sian solvon. Li vidis la kazojn TUNIZIO kaj ALGERIO, kie la landoj ricevis siajn nomojn de la respektivaj ĉefurboj per aldono de la finaĵo -i-, origine Latina sufikso ekzistanta en multegaj internaciaj landnomoj. Zamenhof imitis tiujn formojn kreante nomojn kiel MEKSIKIO (lando) de MEKSIKO (urbo).

Tamen neniu aplikis tiun sistemon al ĉiuj kazoj de homonimaj geografiaj nomoj. Ili estas pli multaj ol oni ĝenerale supozas. Mi trovis en miaj esploroj pri landnomoj pli ol 30 tiajn nomojn. En miaj unuaj provoj krei landnoman liston kun ia sistemeco kaj/aŭ logiko mi eĉ uzis tiun principon tute senescepte, sed kiam mi trovis daŭre pli kaj pli da kandidatoj por la i-finaĵo, la sistemo ŝajnis ne plu oportuna. En mia fine publikigita landnomsistemo (AKADEMIAJ STUDOJ 85) tiaj i-finaĵoj entute ne estas uzataj.

[*Li poste prezentas longan liston de landnomoj. Laŭ la i-sistemo kaj laŭ sia sistemo.*]

Kompreneble oni povus elekti miksitan «sistemon», sed estus sufiĉe malfacile klarigi al komencanto kial la provinco Québec **devas** esti Kebekio ĉar ekzistas ankaŭ la urbo Québec, dum Monako povas nomi kaj landon kaj urbon; Malto, kaj insulon kaj landon; Gambio, kaj landon kaj riveron, ktp.

Multaj sin nun demandas kiel distingi inter la diversaj homonimajoj se oni ne apliku la i-solvon. La respondo estas, ke ne estas tasko de la esperantistoj plibonigi la nomsituacion en la mondo. Ni devas simple konstati kaj akcepti, ke multaj aferoj estas samnomaj, kaj ni esperantigu **ne lokojn**, sed **nomojn**. Ekzistas la nomo *México*, kaj ĝi bezonas Esperantan formon. Tiu formo estas Meksiko kaj ĝin oni uzu por ĉiuj aferoj kiuj nomiĝas *México*. Ekzistas alia nomo, Québec, kiu fariĝas Kebeko en Esperanto. Se poste estas konfuzo pri kiu Meksiko respektive Kebeko temas, oni faru kiel ĉiuj aliaj lingvoj; oni diru pri kiu temas: la lando Meksiko; Meksikurbo aŭ la urbo Meksiko; la (federacia) ŝtato Meksiko; la provinco Kebeko; Kebekprovinco; la urbo Kebeko; Kebekurbo. Tio estas multe pli rekta kaj facila ol iu i-sufikso kiu malmulton diras. Estas tute la sama afero kiam

pluraj homoj havas la saman nomon. Oni ja ne ŝanĝas iliajn nomojn, sed klarigas pri kiu persono temas.

Ĝis nun mi renkontis nenium, kiu konfrontite kun la tuta listo de homonimoj konservis sian preferon al la i-solvo.

Sed estas pli!

La problemo de homonimoj estas nur ero de la tuta landnoma problemo. Ekzistas ja sufiĉe ĝena haoso en la Esperantaj landnomoj. Kelkaj landoj povas fieri pri 5 - 6 nomoj en la internacia lingvo, kal la diversaj proponoj de solvoj estas sennombraj. La batalo pri la landnomoj estas preskaŭ samaĝa kiel la lingvo mem. Efektive ĝis nun neniu lasis sin multe influi de la argumentoj de aliaj. Oni daŭre proponas siajn proprajn preferojn kaj la haoso apenaŭ ŝajnas baldaŭ malaperonta. Oni venas facile al la ideo, ke jen estas tasko por nia AKADEMIO. Ĝi devus agi por unuecigi la lingvon. Kial la AKADEMIO nenion faras?

Sed fakte, ĝi ja ion faras. Jam en 1974 la AKADEMIO oficialigis kelkajn landnomojn¹ kaj estas interese noti, ke inter ili estas: Gvatemalo, Meksiko, Nikaragvo, Panamo, Paragvajo, Sudano kaj Urugvajo. Tute laŭ la sen-i-a sistemo!

Mi ne scias por kio ni havu nian AKADEMION, se ni ne uzu tiujn oficialajn formojn kaj ilin imitu ĉe formado de aliaj nomoj.

En la fino de 1985 la AKADEMIO eĉ pli rekte agis per *«Rekomendo pri la landnomoj»*, kies kvara paragrafo tekstas: *«Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia "sufikso" aŭ sufikse vasta uzuata fremda vorto (-io, -(i)stano,...) se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.»*²

(...)Kaj nun mi alvenas al la eble sola, sed ja tre forta argumento **por** la formo KEBEKIO: ĝin unuanime (laŭdire) uzas kaj preferas la Kanadaj esperantistoj. Sed se oni ne kuraĝas proponi miksitan (haosan) sistemon, oni **aŭ** ŝanĝas KEBEKIO al KEBEKO kune kun 3 - 4 aliaj nomoj ĉe kiuj la i-formo pli oftas, aŭ oni konservas KEBEKIO sed ŝanĝas preskaŭ 30 aliajn nomojn de la tradiciaj simplaj formoj al tute novaj i-formoj.

Aperas ĉi tie la ĝenerala demando, ĉu estas la koncernaj landanoj mem, kiuj devas elekti nomon por sia lando en Esperanto (do, fakte ne la landanoj, sed la esperantistoj inter ili). Sed mi persone forĵetas tiun ideon. Sistema apliko de ĝi neeviteble rezultus en plej haosa «salato» de nomoj sen iu ajn unueco. Devas esti la tuta monda esperantistaro, kiu kune posedas kaj evoluigas la internacian lingvon, kaj estas la AKADEMIO DE ESPERANTO, kiu tiun uzon registras kaj foje influas per rekomendoj kaj oficialigoj. □

1. Aktoj de la Akademio II, 1968-1974, Parizo, 1976.

2. Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto, nova serio n-ro 4, Novembro 1985. Publikigita interalie en revuo *Esperanto* n-ro 963, Marto 1986. LA RIVEREGO jam raportis pri tio.

Reagoj

de Petro Collinge

Sur tiu kampo ekzistas nur du **bazaj** solvoj: unu tute sekmisma kaj la alia tute naturisma. Nu, ni tuj konstatas, ke nek la unua nek la dua estas plene uzablaj. Do de la komenco de nia diskutado ni devas akcepti, ke la demando ne estos tute logike solvita kaj estos **esceptoj**, kiujn ni devos parkere memori al niaj lernantoj. Mi scias, ke la vorto «escepto» estas tabuaĵo en Esperanto, sed sur la kampo de geografio (kaj de historio) certaj realaĵoj trudas sin nerezisteble.

Klare estas, ke unu el la plej gravaj principoj de nia internacia lingvo estas ĝia skemismo. Se ni volas konservi la facilecon kaj purecon de Esperanto, ni senĉese devas batali kontraŭ la naturismaj tendencoj, tiel ke la neeviteblaj esceptoj estu kiel eble plej malmultaj.

Aliflanke nia amiko Wennergren pripledas la principon, ke oni traduku nomojn, ne realaĵojn. Mi tute ne konsentas. Ekde la komenco de nia lingvo Zamenhof plej zorge agis, por ke Esperanto havu kiel eble malpli da homonimoj. Tio estis vera sur la kampo de la ĉiutaga leksiko kaj mi povas imagi neniun motivon, ke tio ne veriĝu ankaŭ pri geografiaj vortoj.

Mi ne povas - kaj ne volas - trakti ĉi tie la tutan problemon, kiu estas tre kompleksa. Mi tamen diru tuj, ke pro la fundamenta skemismo de nia lingvo mi apriore favoras la uzadon de la sufikso **-i-** en ĉiuj kazoj, kiam la nomo de lando aŭ regiono estas prenita de la nomo de iu geografia specialaĵo. Certe povas esti esceptoj (kaj mi rediras, ke ankaŭ en Esperanto povas ekzisti esceptoj). Ekzemple la urbo *Brasilia*. (...) Ankaŭ *Paragavajo* kaj *Urugvajo* metas problemojn. (...)

Sed tion mi ne volas pli longe pridiskuti. Nur al unu afero mi volas altiri la atenton de la leganto: kiun ajn principon oni elektos por la solvo de nia problemo, ŝajnas al mi ke ĉiuokaze uzendas la sufikso **-i-** almenaŭ kiam la landnomo estas prenita de urbonomo.

Kiam oni loĝas en regiono aŭ lando kies nomo estas tiu de la ĉefurbo, oni ĉiutage kontraŭas problemon pri kiu alilandanoj eĉ ne pensas. Loĝante en Kebekio mi ja scias, ke kiam franclingvano legas aŭ aŭdas pri «les Québécois», li ĉiam povas dubi ĉu temas pri la loĝantoj de la urbo Kebeko aŭ de la provinco Kebekio. (...) Mi aldonu, ke tre ofte la skribanto, kiu havas sian ideon en la kapo, tutsimple ne pensas pri rimedoj por ke lia skribo estu tute klara. Nu, Esperanto trovis mirindan rimedon por eviti tiajn miskomprenaĵojn: mi petegas, ne forprenu de ni tiun racian, logikan rimedon komprenigi nin kalre!

Estas dua problemo: se ni akceptas la uzon de la sufikso **-i-**, ĉu tio valoras nur por la suverenaj landoj, aŭ ankaŭ por regionoj, provincoj, ktp?

Unue ni rimarku, ke en pluraj Eŭropaj landoj ekzistas multe da regionoj aŭ regionetoj kies nomo devenas de la nomo de ilia ĉefa urbo. Ekz.: en Francio, «le Lyonnais» estas la regiono ĉirkaŭ la urbo «Lyon». (...) Multaj el tiaj regionnomoj estas pure historiaj kaj ne plu respondas la nunan politikan situacion, sed ili ankoraŭ estas ofte uzataj en la ĉiutaga vivo.

Pri la nuntempa situacio mi opinias, ke oni devas fari grandan diferencon inter teritorioj kiuj estas nur administraj distriktoj kaj regionoj kiuj havas ian suverenecon. (...) En Kanado, Kebekio malgraŭ la erariga signado per la nomo «provinco», estas vere ŝtato tre aŭtonoma. Miaopinie oni devas paroli pri **Kebekio**, ne pri **Kebekprovinco**.

Fine nia amiko Wennergren metas la ĝeneralan demando, ĉu estas la koncernaj landanoj aŭ regionanoj mem, kiuj devas elekti la nomon de sia lando aŭ regiono. Li respondas nee. Mi ne tute konsentas kun li. Memkompreneble lingvikistoj devas decidi pri tio. Sed ili devas antaŭe konsulti la koncernatojn. Se ili konsistigas aŭtonoman grupon kaj precipe se ili konscias ke ili formas apartan popolon, oni nepre devas laŭiri ilian opinion.

Konklude (...) mi opinias, ke oni devas paroli pri Kebekio. La uzado de **Kebeko** estus dusenca kaj respondus nek al la precizeco postulita de nia lingvo nek al la sento de la plimulto el la Kebekianoj. □

de Kajmo Brent

Kajmo ne respondis skribe, nur parole dum iu MEK-kunveno. Jen skizo de lia opinio:

S-ro Wennergren konsideras Esperanton kiel projekton. Tiel li povas ludi en sia kabineto sistemigi la landnoman sistemon. Nur konsiderante la lingvon kiel projekto oni povas aserti, ke akcepto de la formo *Kebekio* devigus nin ŝanĝi 30 aliajn nomojn.

Lingvo estas socia fenomeno: oni devas iel akcepti la lingvouzon. La *miksita* sistemo estas nun uzata, kaj ĝi tamen bone funkcias. Lingvoplanado devas ankaŭ konsideri la flankon socian, ne nur strebi al neebbla logiko kaj reguleco.

Ĉar la landanoj uzas la nomon de sia lando plej ofte, ili rajtas je decidorajto. La esperantistoj ne ŝafe sekvas la la naciajn lingvojn, ĉefe se ili estas dusencaj. La haoso daŭras, ĉar ĉiuj proponas sian sistemon: S-ro Wennergren same faras.

Petro Collinge kaj Kajmo Brent ambaŭ legis la tutan leteron de Bertil Wennergren antaŭ ol reagi. □

Informa Kampanjo

En la lasta LA RIVEREGO, oni raportis pri multaj informaj projektoj, kiujn ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA estis stariganta okaze de la Jubilea Jaro. De tiu tempo okazis multo pri tio. Jen do kelkaj raportoj.

Aŭtobusaj afiŝoj

Dank'al la anoncoj en ALUMETO kaj LA RIVEREGO, ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA ricevis la tutan sufiĉan monon por plenfari tiun projekton. Estas sciinde, ke la Montreala Esperanto-Klubo kontribuis je 1000 \$. Kaj multaj kontribuis je 100 aŭ 200 \$. Ni multe dankas ĉiujn donacintojn. Ni fakte ricevis pli da mono (2193 \$) ol ni bezonis (2098 \$), kaj la estraro decidis uzi tiun kroman monon por la aliaj Jubileaj projektoj.

La afiŝoj jam de februaro videblas en la aŭtobusoj de la S.T.C.U.M. (Montreala insulo), S.T.R.S.M. (suda bordo) kaj S.T.L. (Lavallo). Plej verŝajne ili ankaŭ estas en la Kebekaj aŭtobusoj. Do entute 830 belaj kaj vidkaptaj afiŝoj.

La ĉefa celo de tiu projekto estis sciigi la ĝeneralan publikon, ke Esperanto ankoraŭ ekzistas. Kelkaj homoj ja konas la vorton Esperanto, sed opinias, ke temas pri delonge malsukcesinta projekt-lingvo. Tiel, vidante afiŝojn kun la vorto Esperanto, ili scios, ke la afero pluvivas.

Sed ankaŭ alvenis pluraj informpetoj. La nombro de la informpetoj jes multobliĝis. Sed ankaŭ, kaj pli grave, kontaktis nin kelkaj gazetistoj, kiuj vidis nian afiŝon. Ili esploris la aferon, kaj trovis la temon interesa por priparoli. Se la redaktoroj same opinias, ni povos vidi artikolojn pri Esperanto en revuoj kaj gazetoj tiom famaj kiom LA PRESSE, L'ACTUALITE, MA CAISSE kaj ankaŭ VICE VERSA, aŭ TEMPS LIBRE (revuo pri studenta turismo, kies eldonkvanto estas 300.000 ekzempleroj, senpage disdonataj en kolegioj kaj universitatoj).

Verŝajne ankaŭ pro la afiŝoj, eĉ radio- kaj televid-stacioj postkuras Esperantistojn. Jam estis eta intervjuo de Normando Fleury ĉe Télévision Quatre Saisons, sed ankaŭ Radio-Québec kaj Radio-Canada kontaktis nin por intervjuo eventuala.

Des fleurs... à la carte

Ankaŭ tiu projekto progresas. Patrizio, la Ĉilia grafikisto, kiu desegnis la afiŝon por la aŭtobusoj, helpis nin tiurilate. Li ekinteresiĝis pri Esperanto. Li do pripensis manieron aranĝi la ĉambron, kie okazos la ekspozicio kaj la tabulojn, kie estos dismetitaj la bildkartoj. Sed ĉefe la estraranoj devos zorgi pri la muntado de la tuto.

La ekspozicio tutcerte okazos cetere, en junio, en la ekspozicia ĉambro de la Botanika Ĝardeno Montreala. Per tiu ekspozicio, ni celas vidigi al la

publiko iun utilecon de Esperanto, ĝian internaciecon: ni estos sukcesintaj (espereble) kunigi bildkartojn pri floroj el multegaj landoj en la mondo kaj espereble el ĉiuj kontinentoj. Tial ni sendis petojn pri sendo de bildkartoj floraj al ĉ. 60 landaj asocioj kaj unuopuloj dise tra la mondo. Se vi havas korespondantojn, ili ankaŭ povas kontribui. Sed nur bildkartoj pri **floroj**.

Jam la Montrealaj urbaj instancoj multe ĝin reklamis, kune kun la aliaj aranĝoj de la Botanika Ĝardeno dum la jaro 1987-a. Por la inaŭguro, oni presos oficialajn invitilojn, ĉeestos gazetistoj kaj reprezentantoj de asocioj ktp. Normando Fleury eĉ intencas provi, ke la invitiloj estu dulingvaj: france kaj Esperante. Okazos gazetar-prelego, dum kiu eblos prezenti la projekton, nian Societon kaj Esperanton.

Aliaj projektoj

La disdonado de la **paĝindikiloj** jam komenciĝis en Montrealo. Patriko Mongeau respondecas pri tio. Li ankaŭ eksendis pakajojn de ili al Hull kaj Alma, kie ni trovis disdonantojn. Ankaŭ okazas disdonado en la Kebekaj librovendejoj. **Sed mankas ankoraŭ multaj urboj, eĉ gravaj; E.S.K. bezonas volontulojn por disdoni paĝindikilojn en librovendejoj kaj bibliotekoj.** Oni kelkfoje riproĉas, ke la Kebekia movado estas tro Montrealeca. Sed, por disigi ĝin, oni bezonas kunlaboremajn ekster-Montrealecojn.

La estraro decidis, ke E.S.K. ĉi-jare ne partoprenos en **Le Salon de la Jeunesse**. Ni jam faris dufoje, tio bezonas multan energion (kaj ĉi-jare ankaŭ multan monon) kaj tio ŝajne ne donas grandajn rezultojn.

La kunlaboro inter E.S.K. kaj la porpaca revuo **Zone Libre** daŭras. La revuo nuntempe frontas grandajn financajn problemojn, kaj ĝia apero ne estas plej regula. Pri la verkado de la artikoloj ĉefe respondecas Normando Fleury. □

Nova estrarano

La estraro trovis kvinan estraranon, anstataŭigi Jeff Brower, kiu demisiis pasintan decembron. Ni unue invitis Paul Poitras ĉeesti estrar-kunsidon, sed li taksis sian scipovon de Esperanto ne sufiĉa. Dum la estrar-kunsido, kiu okazis la 9-an de marto, ĉeestis Remigiusz Mielcarek, kiu, vesperon finitan, akceptis deĵori kiel estrarano de E.S.K. ĝis la Maskuta kunveno, en julio, dum kiu okazos estrar-elektoj.

daŭrigo paĝo 11

MEKaj Paĝoj

Nova estraro

La 13an de januaro 1987, MEKo elektis novan estraron. Sep homoj kandidatiĝis, ekzakte tiom, kiom ni bezonis. Do ĉiuj unuanime estis elektitaj. Silvano Auclair fariĝis prezidanto; Normando Fleury, kasisto; Patriko Mongeau, sekretario; Marcelo Desjardins, Diana Dufort, Frank Labelle kaj Miroslav Ludva, konsilantoj.

Pli organizita laboro

Tiel ke ne nur la estraranoj laboru, kaj tiel ke estu responsuloj pri precizaj farendaj taskoj, komitatoj fondiĝis. Tiuj, kiuj ŝatus helpi, kontaktu la responsulon de la komitato, kiu interesas vin, laŭ la jena listo:

komitato pri:	responsulo:
biblioteko kaj arkivoj	Miroslav Ludva
eksterlandaj relatoj	Patriko Mongeau
informado kaj jubileo	Normando Fleury
instruado	Silvano Auclair
kluba vivo	Miroslav Ludva
telefona servo	Diana Dufort

La komitato pri informado jam planis meti afiŝojn en bibliotekoj kaj universitatoj, aranĝi prezentojn en bibliotekoj kaj kontakti la amaskomunikilojn kiel Radio-Canada International kaj Radio-Québec. Tiu pri instruado organizis esperantan kurson por komencantoj, kiu komencis la 19an de marto. Instruas Silvano.

La komitato pri kluba vivo organizas la klubajn vesperojn, kiuj okazas la unuan lundon de ĉiu monato, eĉ dum la somero. La programo de tiuj renkontiĝoj estas pli-malpli jene:

komenco je la 19a horo
progresiga kurso ĝis la 20a
prezento de movada temo (10 minutoj)
prelego (20 minutoj)
paŭzo (10 minutoj)
raportoj de la komitatoj
kantado (20 minutoj)

Ĉiufoje, oni elektas tiujn, kiuj zorgos pri la diversaj programeroj dum la venonta renkontiĝo, kaj interalie elektas animanton, kies rolo estas provi ke ni orde sekvu la programon.

Krome, la komitato pri kluba vivo zorgas pri la redaktado de bulteneto. Tiu bulteneto aperos kiel kelkaj paĝoj en *La Riverego* (bulteno de ESKo), kies kosto MEKo repagos al ESKo. La MEKanoj kiuj ne ricevas *La Riveregon* ricevos tiujn paĝojn de MEKo solaj en koverto.

Teatro

Kelkaj anoj de la klubo baldaŭ provos prepari teatraĵon por prezenti interalie dum la Kanada Kongreso en Maskuto. Ĉu vi jam aliĝis tiun kongreson por vidi ilian talenton?

Kiel la klubo fartas?

Ĝis nun, 22 homoj pagis kotizon al MEKo por 1987. Ni esperu ke aliaj alvenos. La klubo estas mildolare riĉa. Tio povas helpi agadon. Venu la ideoj!

daŭrigo de paĝo 9

La estraro krome konsistas el Normand Fleury, Patriko Mongeau, Sylvain Auclair kaj Victor C. Jaar. Ni cetere profitas la okazon por inviti la membrojn de ESK pripensi la eblecon iĝi estrarano de la Societo. La estraro de ESK nuntempe estas la ĉefa antaŭeniganto de la Movado en Kebekio. □

La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia

Marto 1987-a. N-ro 6-a

Ĉi-numere:

Denove pri Kebeko/Kebeĥio

Okazas vigla informado

MEK-aj paĝoj

Invito al Akvanezio.

Société québécoise d'espéranto

C.P. 126, succ. Beaubien

Montréal, Québec

H2G 3C8